2-a Jaro, N-o 34 (86)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

20. Majo 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

LA ĜENERALA STRIKO EN ANGLIO

Antaŭ ne longe aperis libro verkita de Trocki nomata "Kien iras Britio". En ĝi estas analizo de la postmilita Britio. Li atakas religion, li atakas reformismon. La anglaj famuloj siavice atakis Trocki, pro lia neŝato de la monarkio aŭ alia negrava, flanka argumento, sed ili neniel eĉ tuŝas la fundamenton kaj klaran priskribon de Trocki.

La aferoj en ĉi-tiu lando okazis ĵus kiel priskribis ilin Trocki. La kapitalistoj atakas la laboristojn. Je tiu konflikto, la reformistoj ne scias kiel sinteni. Ili ŝanceliĝas.

La registaro de konservativuloj, sub Baldwin aranĝis, ke enketo okazu en la karbindustrio. Ĝi ne estis la unua. La unua okazis antaŭe sub antaŭa registaro. En ĝi partoprenis reprezentantoj de laboro kaj kapitalo. Ĝia raporto kondamnis la nezorgemon de la minejposedantoj kaj rekomendis la naciigon de la industrio.

La nuna registaro estas nekontenta je ĉi-tiu konkludo kaj pro tio nun elektis komisionon, sole el kapitalistoj kaj sen laboristoj. Ĉi tiu raportis, ke la salajroj estu malaltigataj.

Lastan jaron kiam konflikto minacis flanke de minejlaboristoj kontraŭ la posedantoj, la sindikataj estroj gvidis la tutan aferon. La politikuloj penis enpuŝi la nazon por kontroli la laboristojn kaj en tia maniero silentigi la postulojn de laboro.

Sed la sindikatanoj ne permesis al la reformistoj flankenigi la amasojn en la "Trade Uniono" (sindikatoj). Se la Macdonaldoj estus sukcesintaj havigi al si tiun kontrolon, la nuna grandskala konflikto eble neniam estus okazinta.

Oni memoras, ke en 1919 la fervojistoj strikis kaj malgajnis, sed poste okazis, ke la amaso voĉdonis por labora registaro, tio pruvas, ke estas neeble subpremi masmovadon. Se la registaro subpremas ĝin unuflanke, ĝi sin esprimas alimaniere.

La laboristoj tiam perdis la konflikton industrie, sed sin esprimis politike. Tamen nun la registaro firme decidis subpremi la vivnivelon de la tuta laborista klaso kaj komencis per la atako kontraŭ la plej granda sindikato, kies membroj produktas bazan varon, karbon — nome kontraŭ la karbministojn. La karbministoj alvokis al la subteno de la (General Council of The Trade Union Congress) Ĝenerala Konsilantaro de la Sindikatara Kongreso tiel la konflikto etendiĝis. La GC de la TUC alvokis kunvenon de ĝiaj aliĝintaj sindikatoj kaj ili solidare voĉdonis al la subteno kaj kuna partopreno en la konflikto.

Do, la posedantoj de la karbminejoj lokaŭtis la ministojn sabaton la unuan de Majo. Tuj poste la GC de la TUC decidis ĝeneralan strikon, komencanta lundon meznokte. La registaro ŝanceliĝis nesciante kion fari.

Ĉar tiu masmovado havas en si la potencon evolui al revolucia krizo. Eĉ antaŭ la komenco de la lokaŭto (sabate) la GC de la TUC proponis al la registaro prizorgi la aranĝojn pri la enveno de manĝaĵoj. Jen klaspeno por akiri povon. Al ĉi-tiu la registaro ne konsentis. Ĝi preferis evoluigi sian propran mekanismon nome la faŝistan organizon kun la OMS (Organization for the maintainance of supplies) organizo por la daŭrigado de la (provizaĵoj) varoj. Estis bezonantaj 2 cent mil homoj minimume por ĉi tiu registara provizora organizo sed en ĝi enregistriĝis nur 10000 homoj.

Por allogi aliajn, la registaro proponis pagon de 1 £ unu funt. sterl. tage. Ĝi jam dividis la landon en 10 distriktoj, ĉiu sub aparta komisionulo (estro), kontrolata de Londono. Ĝi alvokis al siaj regimentoj la specialajn respondojn kaj proklamis DORA (*D*efence *o*f the *R*ealm *A*ct = Leĝon por la defendo de la reĝlando). Kiu signifas, ke speciala danĝero minacas kaj pro tio, ke la normalaj leĝoj ne plu taŭgas por pritrakti laŭ ili. Do, anstataŭ civilaj leĝoj la lando estas nun sub provizora milita leĝo. Nun la policano rajtas aresti iun ajn sen asigna permeso.

Li rajtas eniri en iun ajn domon sen aŭtoritato. Antaŭ la komenco de la striko, la presistoj eĉ rifuzis eldoni la "Daily Mail", ĉar per ĉefa artikolo la reĝo mem enmiksis en tiu konflikto, same okazis al "Evening Standard", ĉar ĝi enmetis reklamon de OMS. Ambaŭ tiuj tagĵurnaloj ne aperis lunde.

Ni do konkludas, ke la klasbarakto pli kaj pli akutiĝas kaj la politikuloj, la reformemuloj devas fine decidi kien iri, ĉu dekstre al la kapitalistoj, ĉu maldekstren al la laboristoj.

La GC, TUC ne estas tute solida, en ĝi estas dekstruloj kaj estas eble, ke ili penos dividi la unuigitan forton de la laborista amaso, tiel la konflikto perdos sian danĝeran aspekton, kies eblan finon al renverso de kapitalismo ili ne estas pretaj estri.

Nuntempe la striko estas solidara, neniu tagĵurnalo aperas, neniu lokomotivo trakuras la landon krom tiu malmultaj kun manĝaĵoj. Oficistoj laborantaj en la civito de Londono devas iri tien piede aŭ bicikli. La gvidantoj diras al la fervoj-laboristoj iru hejmen kaj dormu bone. Kiam ni bezonas vin por rekomenci laboron, ni informas vin. Nu bonan ripozon al ĉiuj. Tiel ili konsilas. *3398.*

Unu tago dum la ĝenerala striko

La stratoj estas silentaj, nenia bruo de tramoj kaj aŭtobusoj estas aŭdebla. La butikistoj havas neniajn tagĵurnalojn por vendi, ĉar la presistoj ankaŭ ne laboras. La ĝenerala striko estas tiom solidara — la laboristoj staras je la stratanguloj, la manojn en la poŝo. Mi eniris kun amiko la parlamenton. Deputito, kiu apartenas al la Labora Partio, li klarigis, ke la seĝlokoj por vizitantoj estis preskaŭ tute okupitaj, sed li penos akiri 2, por mi kaj la amiko.

Ni eniris kaj aŭskultis la disputantojn, kiuj diskutis pri la leĝprojekto por doni eksternorman povon en la manojn de la registaro.

Post paŭzo la ĉefministro laŭŝajne estis kunveninta kun siaj kunuloj de la konservativa flanko en aparta ĉambro, kaj ili eniris samtempe al siaj sidlokoj. La ĉambroj, kutime nur duonplenaj, subite pleniĝis de deputitoj por aŭskulti la decidon de la kunveno kiun intencis esprimi la ĉefministro. Oni duonvoĉe siblis, ĉu la registaro subiĝos al la minaco de la ĝenerala striko. Silentiĝis. La ĉefministro ekstaris kaj — kun malmultaj vortoj, firme deklaris: Ne estis registara kulpo, sed estis la laboristoj, kiuj subite ĉesis laboron kaj tiel malebligis daŭrigi la rilatojn. Pro tio, jesas ne rekomenci rilatojn ĝis kiam la laboristoj ĉesigos la ĝeneralan strikon. La deputitoj de la Labora Partio, kiuj estis elektitaj antaŭe por esprimi la bezonojn de la strikantoj (de la sindikatoj) staris unu post la alia por deklari la kontraŭon. La interrompo fakte okazis, ĉar la registaro subite ĉesigis la subvencion al la minejposedantoj, kiuj siavice lokaŭtis la ministojn proponante al ili pli longan labortagon de 8 horoj anstataŭ 7 samtempe kun pli malalta salajro ol antaŭe. La laboro de karbministo estas danĝeroplena kaj ili certe meritas ĉiun pencon kiun ili ricevas.

Post la plua diskuto la deputitoj pograde iris al la manĝoĉambro por trinki (eble ankaŭ por drinki) multekostan ĉampanon kun viando en bonestreĉita ventro ilia. La kosto de unu tia manĝo estis egala al la salajro, kiun akiras la ministoj post peza laboro por tuta semajno. Kaj estis kanajloj tiaspecaj en bonaj vestaĵoj, drinkante luksajn vinojn, kiuj surprenas sur sin la sorton de milionoj da homoj akirante sian salajron per la ŝvito de la brovo aŭ de la brako!

Ni denove forlasis niajn seĝojn por ripozi kaj trinki ne ebriigan vinon, sed teon kaj ni interparolis. Mi opiniis, ke ni devas priparoli la firman respondon de la ĉefministro, ankaŭ pri la nefirma propono de Laboro Partiestro, por rekomenci intertraktojn, kun iu deputito de la Labora Partio. Feliĉe ni renkontis la deputiton de nia distrikto kaj mi rakontis al li miajn impresojn nekuraĝigajn. Mi proponis al la deputito, ke la estro de la Labora Partio devis montri sin firma, kaj nevenkebla kontraŭ la batalinvito de la registara klaso. Mi pensas, ke la registaro tiel vidos, ke la sindikatoj intencas serioze batali kaj despli rapide penos siaflanke rekomenci la traktadon. Li al mi diris, ke la sindikatoj konsentis al la propono, kiun esprimis la LP-estro en la parlamento (por rekomenci traktadon) kaj pro tio nenio ekscita okazis. Li diris sian privatan (apartan) opinion, ke estus multe pli utile, se la LP deputitoj estus reirintaj al siaj respektivaj distriktoj kaj estus parolintaj al siaj elektantoj, kiuj nun strikas kontraŭ registaro firma en sia tirana regoseĝo. Al tiu ankaŭ mi konsentis.

Vespere ni forlasis la ĉambron de deputitoj. Veturiloj neniuj estis kurantaj sur la stratoj. Do ni promenis al la kvartalo, kie oni kutime presigas la tagĵurnalojn. Ni subite en flankstrato rimarkis vicon da policanoj, starante trans la strato, kiu malpermesis al iuj iri en tiu strato. Estis nenia tagĵurnalo. Do, ni ne povus eltrovi la kialojn en tiu maniero per la legado. Ni ankaŭ rimarkis multajn aŭtobiciklojn. Do ni iris al apude starantaj grupoj kaj demandis la kaŭzon de tiu granda nombro da policanoj. Kaj ni eltrovis, ke la presejo de la laborista tagĵurnalo "Daily Herald" intencas rekomenci kaj presigi tagĵurnalon por la laborista flanko dum la disputo. La registaro jam utiligis la presilojn de la patriota tagĵurnalo Morning Post (Matena Poŝto) pagante per la ŝtatmono por la presigo de oficiala ĵurnalo British Gazette (Brita Gazeto). La sindikatoj deziris esprimi sin en aparta ĵurnalo kaj presigis ĵurnalon British Worker (Brita Laboristo). Antaŭ ol presigi ĝin la LP-deputito devis en parlamento akiri la permeson de la registara klaso por la eldono de tiu nova neregistrita ĵurnalo. Tiun permeson akirita, la presiloj ekbruis, la aŭtomobiloj sinsekvis unu la alian, la ĵurnaloj elĵetiĝis el la truo en la konstruaĵo. — La atendanta publiko laŭte aplaŭdis, ĉar fine oni nun akiris informon de la sindikata flanko dum la disputo.

Mi akiris mian kopion de la strikbulteno kaj ĉar jam estis malfrue, mi hejmenmarŝis por dormi trankvile post ekscitoplena tago.

3398.

Eĥo de majdemonstracio en Leipzig

Kaŭze de la politikaj cirkonstancoj en Germanio, depost kelkaj jaroj la majdemonstracioj estis disaj. Tamen neniam mankis voĉoj admonantaj, ke almenaŭ demonstracio dum 1. Majo estu komuna. Tiel ankaŭ ĉi-jare tiu ĉi deziro estis ege forta, des pli, ĉar la subpremado de la laboristaro neniam atingis tian gradon, kiel nun en la "benita" Daves-respubliko. Multnombre la laboristoj postulis de la laboristaj gvidantoj unuecfronton almenaŭ por la 1. majtago. En multaj urboj ĉi tiuj voĉoj estis aŭditaj kaj laŭ tio komunaj majmanifestadoj estis aranĝitaj. Bedaŭrinde pri Leipzig oni tion ne povas raporti. Oni nur trovis surdajn orelojn. Intertraktadoj celantaj la unuecon restis nefruktedonaj. Alvenis nun la sopirita tago. Posttagmezo 1.30 horo el ĉiuj urbpartoj almarŝis la laboristoj, movante sin al la centro, sur la placon de Aŭgusto. Sur dekstra flanko grupiĝis la komunistoj kaj sur maldekstra la socialdem. Post la alveno de la lastaj demonstrantoj el la distriktoj, la amaso formiĝis, por komune marŝi al la ekspoziciejo sur kiu okazu la majfesto aranĝita de la socialdem. kaj sindikata kartelo. Tamen, alveninte tie granda skandalo okazis. Anoj de la "regna standardo nigra ruĝa ora" kune kun policistoj baris la vojon, ne enlasante la komunistojn. Kiam la laboristoj provis enpenetri per helpo de la ruĝaj frontbatalantoj, la anoj de la "regna standardo" kun policistoj kontraŭstaris kaj ekestiĝis batalo. Bedaŭrinda fakto. Laboristaj fratoj batas sin reciproke, dum la mondinterfratiga tago, eĉ apogante sin sur policistoj.

Sed ĉiuj perfortaĵoj ne helpis. La unuecvolo de la proletoj estis pli forta, kaj ili ĉiuj eniris la placon, sur kiu komprenēble akra disputo daŭris, trafe montrante la skismon, bedaŭrinde ankoraŭ ekzistantan inter la laboristaro. Ni esperu, ke dum estontaj majmanifestoj tiaj interpuŝiĝoj abomenaj forrestu, ke la laboristoj ekkonu la nepran neceson starigi la proletan unuecfronton kontraŭ la ĉiam pli kaj pli rabema kapitalo; fakto kiu de ni nepre postulas pli ol antaŭe.

Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu!

Voko.

Svisio

Parazitaj dividendoj

2000 frankoj da jarsalajro por la laboristo,
6000 frankoj dividendoj po laboristo por la akciuloj.

La "Aluminio-industri-akcia societo Neuhausen" okupas en Neuhausen proksimume 200, en Chippis (Valezo) 1800 laboristojn. En jaro 1925 ĉi-entrepreno atingis netan profiton da 12 milionoj. La akcia kapitalo sumiĝas je 50 milionoj da fr. La proponita dividendo estas 15 %, sed efektive ĝi atingas 25—30 %, ĉar granda parto el tiuj 50 milionoj konsistas el tute senpage disdonitaj akcioj (disdonitaj kiel superdividendo). La proporcia gajno por la akciuloj estas do multe pligranda ol oni ŝajnigas. Krome la fabriko disponas pri grandegaj rezervaĵoj. Ekzemple la konstruaĵoj en konstruvaloro da 72 milionoj estas ankoraŭ menciitaj en valoro de 14½ milionoj. Pli bone ankoraŭ oni komprenas ĉi tiujn ciferojn, kiam oni vidas la laboristojn en Chippis, kiuj sub pezega laboro kaj preskaŭ neeltenebla temperaturo gajnas 75 centimojn pohore. Kalkulante eĉ 80 cent. pohore, tio faras nur gajno da 1996,80 fr. dum tuta jaro (—.80 oble 48 oble 52) aŭ rondcifero 2000 fr. La akciuloj-parazitoj, kiuj eĉ ne movas unu fingron enpoŝigas per du mil laboristoj 12 milionojn, t. e. 6000 fr. po laboristo. Alivorte: la aluminilaboristo gajnas potage maksim-

ume 6 fr. por si mem kaj perlaboras la trioblan sumon por la akciuloj. Se oni duobligus la salajron de la laboristoj, tiam la akciuloj ĉiam ankoraŭ ricevus senlabore la saman sumon, kiel la laboristoj.

La aluminio-akcia societo estas tipa grand-kapitalista dividenda entrepreno. Tie montriĝas plej bone la maljusteco de la kapitalista produktado kvazaŭ sub mikroskopo.

3477.

La unuecfronta laboristaro batalas kontraŭ la faŝismo

Dimanĉon la 25. Aprilo la faŝistoj de nia urbo Plzen (Pilzen) okazigis publikan mitingon en la granda ĝardeno de "Restoracio Salcmann". La mitingo estis kunvokita je la 10. horo antaŭtagmeze kaj ĉirkaŭ la 9. horo jam pleniĝis la ĝardenego de la laboristoj el ĉiuj pol. tendencoj en nombro de 700—850 personoj, por komune montri sian apation al la kreskanta reakcio kaj protesti kontraŭ la faŝismo, la mortigistoj Zankov, Horty, Musolini ktp. La veraj faŝistaj herooj, kiuj en siaj gazetoj tiom entuziasmiĝas, ne venis al la mitingo. La ĉefo de la loka nacia partio s-ro Tuĉek montriĝis apenaŭ en la pordo, sin certiginte pri la situacio silente malaperis.

La kuraĝo de la faŝistoj malaperis konsiderante la grandan plimulton de la laboristaro. En la koridoroj de la domoj estis niaj ruĝaj skoltoj gardostarantaj. Ĉiuj pordoj estis garditaj komune de lab. grupoj soc.-demokrataj kaj komunistaj, same ankaŭ la gravaj lokoj en la ĝardenego kaj alie estis okupitaj de socialdem. kaj kom. junularo. La faŝistoj, el kiuj kelkaj estis uniformitaj, baldaŭ konsciiĝis, ke minacas nigra nubo (danĝero), kaj la ĉeestintoj estis devigitaj postuli la malfermon de la mitingo. Paperkomercisto s-ro Paolit (Esperantisto kaj membro de loka burĝa klubo kaj UEA-ano) malfermis la mitingon kun tremanta voĉo, dirante, ke li donos al ĉiu la eblecon paroli (intervokoj: vi donos nenion! ni elektu la prezidantaron!) malgraŭ la protestoj flanke de la faŝistoj estis elektita prezidantaro jena: prezidanto k-do Pech (socialdem.), k-do Ulrich (kom.) kaj k-do Fiala protokolanto. Dum la voĉdono leviĝis ĉirkaŭ 12 manoj "kontraŭ", kio estis akceptita kun ekridego. La faŝistoj, dezirante la mitingon malebligi, ekkomencis kanti nacian himnon "Hej Slovane", kiu perdiĝis en la amasa ekkanto de "For Tiranojn" kaj postsekvinta "Internacionalo". La faŝistoj vidinte, ke la laboristoj demetas siajn ĉapelojn ne demetis la nigrajn ĉapojn, kaj oni devis ilin al tio devigi, verŝajne, ĉar ni rimarkis dum ili forlasis la mitingon, ke iliaj ĉapeloj perdiĝis. La ĉeestintoj akceptis jenan rezolucion:

"La kunvenintoj de la publika faŝista mitingo en Plzen proklamas, ke la proletaro estas unueca en la batalo kontraŭ la faŝismo. Forigu Musolinon! Kontraŭu faŝismon! Vivu la internacia socialista solidareco!"

Post la voĉdonado pri la rezolucio la faŝistoj penis kunvoki konfidan kunvenon inter si, kaj kriante tion malantaŭ la dorsoj de la policagentoj ili penis atingi sian celon. En tiu momento enpenetris kordono da policistoj la ĝardenon kaj elpuŝis la amason, multaj estis arestitaj el niaj k-doj. El la vicoj de la laboristaro iu donis la iniciativon fari "spaliron" (honoran gardon) al la nigroĉemizuloj, kiuj devis iri (sen ĉapoj) en mezo de la strato, ambaŭflanke laboristoj kaj ili mem ĝojis esti garditaj antaŭ la bruanta amaso. La faŝistoj konvinkiĝis, ke la Musolini-metodoj ne ĉie taŭgas, kaj povas ankaŭ fariĝi objekto de ridindaĵo; kiel ekzemple en urbo Plzen. Dum la polickordono elpuŝadis la demonstrantojn, la lastaj forŝiris de la muroj ĉiujn faŝistajn afiŝojn, reklamojn ktp. sekvis ekkrioj; honton al Faŝismo, for kun Zankov, for kun la mortigistoj de Matteoti! Jen nia venĝo! Alia polickordono penis fermi la straton, kiu gvidas al ĉefplaco al la demonstrantoj. Sed la granda homamaso rompis la baron kaj plueniris antaŭ la urbdomon, kie estis aranĝita mitingo, kiun la polickordonoj ricevintaj plifortigon malebligis. La masoj disirintaj kunvenis baldaŭ denove en la proksima lab. domo "Peklo" (Infero), kie la mitingo estis daŭrigata sub la malnova prezidantaro. La socialdem. oratoro Ulrich parolante pri la neceso de komuna agado en similaj bataloj atingis grandan ovacion. La kom. parolinto diris en mallongaj frazoj, ke la faŝismo estas komuna malamiko de socialdem. kaj kom. tiel ankaŭ ni ĉiam komune batalu kontraŭ ĉiu ajn faŝista kaj reakcia movado. Kun la kantado de la "Internacionalo" la mitingo estis fermita kaj la laboristaro disiris kun la konvinko, ke samkiel en la batalo kontraŭ la faŝismo, la unueca fronto de l' proletaro estas ankaŭ necesa en la bataloj aliaj.

Plzen 409.

La plendoj de baronoj de la tero

La grandaj terposedandoj multe ploretis pri la postuloj de la terlaboristoj. Dum la pasinta monato, en nia provinco estis kelkaj strikoj, kaj en preskaŭ ĉiu loko, la laboristoj venkis. Estas pro tio, ke la terposedantoj koleras kontraŭ iliaj sklavoj.

La burĝa gazeto, kiu estas eldonita en Perpignan, antaŭ kelkaj tagoj, publikigis artikolon titolitan: "La strikoj" ĝi diris: Oni bone komprenas la bezonon de la terlaboristoj, ĉar la vivkondiĉoj estas ĉiutage pli malbonaj, sed se la laboristoj estas pravaj, la terposedantoj ankaŭ estas pravaj, ĉar se ili devas pagi al laboristoj altajn salajrojn kaj vendi la vinon malkare, ili ne povos pagi, ili baldaŭ bankrotos. Do, se la laboristo volas pli altan salajron, li devas konsenti labori pli da horoj potage, tiam la laboristo povas vivi kaj la terposedanto ankaŭ povos daŭrigi la agrikulturajn laborojn por ne ruinigi la solan riĉecon de la provinco, kiu estas la agrikulturo."

Per tiu artikolo, oni povas vidi la ideojn de magnatoj de la tero, ili volas pagi la pasintajn kaj la venontajn militojn per la fortoj de la malfeliĉaj kamparanoj, kiuj estas devigataj suferi dum somero sub la brulanta suno, kaj vintre en malvarma vento, dum la "filoj de patreto" promenas kaj sin amuzas kune kun iliaj amikoj, malŝparante la monon, gajnitan per ŝvito de iliaj modernaj sklavoj. Tra la jarcentoj la laboristoj kredis rompi la ĉenojn de la sklaveco, sed bedaŭrinde, tio estis nur iluzio, la realeco estas tute alia, la realeco estas, ke dum la sklavoj suferas, la baronoj de la tero vivas lukse, kiel la antikvaj sinjoroj de la mezepokaj tempoj.

Eble multaj el niaj kamaradoj ne volos kredi min, sed estas vero, kion mi rakontas al vi. En la provinco de orientaj Pirineoj, estas ankoraŭ centoj da hispanaj terlaboristoj, kiuj loĝas en staloj kiel la brutaro, mi mem loĝis dum dek jaroj en stalo kiel ĉevalo, tamen mia mastro loĝis en bela domo kvazaŭ palaco. Por plej multaj el ni "fremdaj" laboristoj, la pajlo estas nia matraco por kuŝi kaj dormi, ĉar por "fremduloj" tio sufiĉas.

En multaj vilaĝoj, ankoraŭ ne ekzistas sindikatoj, sed en multaj aliaj ili ekzistas, kaj la sinjoroj koleras pro la libereco de tiuj sklavoj, kiuj laŭ la burĝaj gazetoj estas ribelantaj frenezuloj, kiuj volas ruinigi la patrion, postulante ĉiam pli altajn salajrojn de la bedaŭrindaj malfeliĉaj mastroj.

Malgraŭ la fluo de la progreso, en nia provinco la pastroj estas la mastroj de la kamparanoj, precipe en la malgrandaj vilaĝoj. En malgrandaj vilaĝoj la virino, kiu estas kontraŭ la religio, estas rigardata kiel persono de malbonaj moroj, do vole nevole ili devas viziti la preĝejojn, sed tiu erara moraleco, iom post iom malaperas el la cerboj de la kamparanoj, kaj baldaŭ, espereble, la virino eliras el religia sklaveco por fariĝi libera persono.

La landlimoj kaj la religioj estas malbonaĵoj, kiuj devas esti detruataj per la fluo de la civilizacio kaj anstataŭata per moderna sociordo; per Esperanto oni povas vidi la teorion pasi al la praktiko, kaj tiam oni povos diri, ne estas plu "fremduloj" sur la mondo, sed patrio de la laboristaro, ĉar ni esperantistoj parolas ĉiuj la saman lingvon kiel anoj de unu sola familio.

Ramon Duran (SAT. 3959).

El laborista vivo en Juncal

(Argentino)

Dum la monato Marto, kvazaŭ dudek tagojn sinsekve, strikis la panlaboristoj por nuligo de la dumnokta laboro en panfarejoj. Antaŭ ol lasi la laboron ili prezentis sin antaŭ la mastroj por peti nuligon de tiu, por la sano de laboristoj, tiom danĝera noktlaboro. La kondiĉo estis, ke la laboro ekkomencu je la kvina matene kaj finiĝu je la dudek dua nokte. La plejmulto de la mastroj malakceptis, la plej gravaj kaj kelkaj ne gravaj akceptis. Ĉe ĉi tiuj la laboro estis daŭrigota, ĉe aliaj oni deklaris la strikon, sed post kelkaj tagoj ili revenis al laboro ne atinginte la celon. Ankaŭ ĉi tie estas kulpaj la nekonsciaj, pri sia klaseca devo, multaj kamaradoj.

En la provinco Mendoza, regiono de vinberujoj, strikis en la dua duono de la ĵus pasinta monata Marto la laboristoj, kiuj laboras en grandaj keloj, kie oni preparas kaj konservas vinon. Ili strikis nur tri-kvar tagojn, ĉar ilia postulo pri plibonigo de la salajroj estis akceptita, tial nun ili gajnas $ 4,80 nacia papermono, kvazaŭ du dolarojn, antaŭe ili gajnis nur $ 3,50 de la sama mono, malpli ol unu kaj duonon da dolaro.

Malgraŭ la malbona vetero, ĉar preskaŭ ĉiutage pluvas, oni daŭrigas la rikolton de maizo. Ĉi tiu estas tre abunda ĉi tiun jaron, sed la prezo estas, kompare al pasintaj jaroj, malbona, kaj oni ne esperas pli favorajn prezojn despli, ĉar la troa malsekeco neniigas la bonan kvaliton de maizo, kiu havas malbonan akcepton sur la merkato, ol malbonkvalita. Ĝia prezo nuna estas, kondiĉo nepra, ke ĝi devas esti sana kaj seka, $ 6,80 m/l sur la merkato de havenurbo Rosario, pasintjare ĝia prezo estis ĉirkaŭ $ 10,00 sekve la kamparanoj estas tre malkontentaj, ĉar multaj el ili malprofitos ĉi tiun jaron, ili ne povos kovri la elspezojn; tamen la terposedantoj postulas tre altajn prezojn por la farmo de la tero. Oni pagas bonan, fruktodonan teron eĉ $ 140,00 m/l po ĉiu kvadro (1687 kvadratm.). Sed se la prezoj de grenoj ne plialtiĝos, venos grava krizo, kiu skuos la ĝis nun trankvilan vivon de la kamparanoj. La kamplaboristoj dum ĉi tiuj monatoj de rikolto estas grandnombre okupataj en la rikoltado, eĉ de la urboj venas multaj laboristoj, ĉar la prezoj estas bonaj, tamen por gajni bonan salajron oni devas labori pli ol dek horojn. Sed post la rikolto de maizo multajn milojn da ili minacas la senlaboreco. Iuj kalkulas, ke tiu nombro atingos ĝis 500 000 laboristoj. *SAT-ano 1933.*

La Sankta Ĵaŭdo
evoluado de la katolika religio

Antaŭ kelkaj jarcentoj, la provinco de orientaj Pirineoj, estis almetita al la kataluna regno, kaj pro tio, la nuna loĝantaro precipe la kamparanoj ankoraŭ parolas katalune, sed en la urboj, ĉiuj parolas la francan lingvon; la pastroj en la preĝejoj ankaŭ parolas latine kaj france, sed antaŭ kelkaj jaroj, por revivigi la mortantan religion, dum la Sankta Ĵaŭdo ili parolas kaj paroladas en kataluna lingvo. La lastan semajnon, oni legis en la ĵurnaloj de la provinco: "Granda funkcio ĉe la katedralo de Perpignan, oni parolis en kataluna lingvo; oni povas tre facile kompreni, ke la pastroj kaj iliaj mastroj, la kapitalistoj, volas dormigi la popolon per ĉiuj rimedoj, kiuj troviĝas je ilia povo".

En la vilaĝo, kie mi loĝas, la vilaĝa pastro dum la prediko de la Sankta Ĵaŭdo diris al siaj klientoj: "Rigardu, kiel la judoj mortigis la savanton de la mondo, rigardu, kiel li suferis por ni, nur por ni li estis najlita sur la kruco, nur por niaj pekoj li oferdonis sian vivon", sed tiu pastro tute forgesis, ke en jaro 1909 en Barcelono estis mortpafita pro propagando kontraŭ religio, nia kamarado *Francisco Ferrer,* kiu mortis por la "Moderna Lernejo". La pastroj scias paroli nur pri sia dio, sed ili estas embarasitaj kiam oni demandas ilin, se la proletoj estus sen leĝo antaŭ dio, ĉar li mortis por savi la popolon, mi vidas, ke post lia alveno ekzistas mizero, militoj, malsato, kaj samtempe homoj nomitaj riĉuloj, kiuj nur havis la penon naskiĝi kaj manĝi, dum ni laborante tage kaj nokte, preskaŭ ne povas vivi kiel homoj, sed nur kiel sklavoj samkiel la sklavoj de la antikvaj tempoj; tempoj antaŭ la naskiĝo kaj mortigo de Kristo, do mi demandas la pastrojn; kiu kreis dion, tiom laŭdata de ili kaj de la riĉuloj, dum la malriĉuloj pacience atendas la donacon de dio, ili ŝtelas la sangon de la laboristaro tutmonda.

Iam mi aŭdis pastron diri: "mi faris mian devon dum la mondmilito, mi batalis kiel soldato por defendi mian Patrion", kaj li forgesis, ke en la fundamentaj libroj de la katolika religio estas dirita: "vi ne devas mortigi nek por vin defendi, ĉiuj el vi estas fratoj, amu vin unu la alian"; tamen dum la mondmilito, ili benis la kanonojn, kiuj devis mortigi iliajn fratojn de aliaj landoj. Do, vi tutmondaj kamaradoj povas kompreni la rolon, kiun ludas la reprezentanto de dio, kiu laŭ la katolika opinio, mortis por savi la tutan homaron.

Kiel en nia provinco, la religio perdas terenon, la pastroj, por ke la fideluloj revenu al la preĝejoj, parolas la antikvan lingvon de la provinco; mi kiel kataluno hontas, ke mia kara lingvo servas por subteni la modernan fanatikecon, eble la kamaradoj el Katalunio trovas stranga la aferon, sed estas la pura vero, nia patro-lingvo servas por la katolika propagando en orientaj Pirineoj en Sud-Francio. La katolikoj estas la homoj, kiuj estas plej komikaj el ĉiuj, ili parolas kaj skribas la latinan lingvon, la nacian kaj eĉ la provincan, por daŭrigi la dormadon de la laboristaro por la bono de la internaciaj kapitalistoj; en nia lando oni diras: tiam kiam estos azenoj, la pastroj rajdos trankvile sur la ŝultroj de la laboristoj.

Ofte la homoj parolas pri revolucio, sed tiam kiam la homoj ne liberigos sin de la moralaj katenoj, oni vane atendos veran revolucion, ĉar kun sklavoj, oni neniam faros fruktodonan revolucion.

Tiam, kiam la homoj estas kredemuloj, la progreso restos mensogo. Nur kiam la homo kredos la sciencon anstataŭ al dio, estos eble la liberigo de la homaro kaj de la suferanta laboristaro.

Ramon Duran 3859.

ĈIU SAT-MEMBRO ESTU ABONANTO DE NIA SAT-ORGANO "SENNACIULO"

El la lando de katolikismo
Sovaĝaj religiaj festoj
Festoj en jaro 1926

En vilaĝo nomata *San Vicente de la Sonsierra,* ĉe norda hispana provinco *Alava* (proks. Bilbao), ĉiujare oni festas procesion religian dum la "sanktaj ĵaŭdo kaj vendredo" por demonstracii larĝe la sovaĝan instinkton de manifestantoj.

Pro kuriozeco aliras tien: ĉaroj, kaleŝoj kaj aŭtomobiloj el ĉie, menciitaj veturiloj estas ŝarĝitaj per viroj, virinoj kaj infanoj. Trans belega placo, proksimume je la sesa posttagmeze, oni povas vidi (dum la circitaj religiaj tagoj) je la fronto de la demonstrantaro du imaĝojn (sanktfiguroj el ligno, ikonoj) surŝultre portataj de kvar *homoj,* kaj . . . ho, malspriteco homa! Unu inter ili (nunjare) estas nudpieda kun vizaĝmasko, vestita per blanka robo ĝis la maleoloj; ĉi-robo malkaŝas la tutan dorson kaj ŝultrojn de la nudpiedulo aŭ "pikito", kiel oni nomas tiujn ulojn. Pere de kanaba fadenligaĵo, li mem forte sin batas, senkompate sur la dorson kaj ŝultrojn, t. e. la malkovritan parton. Post kelkaj minutoj prezentiĝas alia *homo* (mi ne scias, ĉu *praktikanto)* kun seka vaksbulo, eniginte en ĝin sennombrajn vitrojn aŭ kristalojn el iu rompitaĵo. Pere de ĉi-ilo, tiu homo batas la dorson de la robulo, de la "pikito", por ke eliru abunda nigriĝinta sango (nigriĝinta pro la batoj de la kanaba fadenligaĵo), kaj kompreneble, tre baldaŭ aspektas tiu dorso kvazaŭ *viandvendejo.*

Ĉu pli da malspriteco kaj sovaĝeco estas eblaj? Mi kredas ke ne, kaj tamen la loĝantoj de tiu vilaĝo sentas sin fieraj, kiam ili konstatas la alvenon de tiuj kuriozuloj por vidi tion, kio nenie estas videbla, neatentante la ĉeestantojn, kiuj seninterrompe diradas: "Tio estas sovaĝado; tio devus esti malpermesata" kaj aliaj frazoj similaj, kiuj esprimas la mallogon kaj naŭzon, kiujn oni sentas.

Mi demandis, ĉu la "pikitoj" kaj "pikantoj" faris tion pro rutino, kredoj religiaj, aŭ . . . Oni respondis al mi, ke ne pro cititaj kaŭzoj, sed ĉar en dirita vilaĝo ekzistas "Kofradio" (religiaj societoj organizitaj en la preĝejoj, direktitaj ĝenerale de la pastroj). Tiaj estas multaj miloj en Hispanio), kies anoj estas devigataj martirigi sin sammaniere, kiel mi supre klarigis, se okaze ne prezentiĝas memvoluloj (volontuloj) por sin puni per la kanaba fadenligaĵo kaj por liberigi sin (la anoj de la Kofradio) de la oferado, ili invitas la plej nesingardemajn ulojn de la vilaĝo drinkadi vinon kaj likvorojn ĝis kiam ili estas ebriaj kaj sentas religiemon. En tia stato oni ilin utiligas por la bono de "nia kara dio", plenigante samtempe la Kofradion kaj multe da monujoj pro la multnombraj partoprenantoj al *buĉado.* Negoco estas negoco, ĉu ne?

Kia malkomprenemo! ili sin sentas (la loĝantoj de la vilaĝo) tre fieraj pro la realigo ĉiujara de tiaspeca ago, kondamnita de la prudenteco!

Forĵetu, vilaĝo de *San Vicente*, tiujn praktikantojn!

Studu, analizu vian hontigan ĉiujaran agon kaj vi ruĝiĝos por ne plu ripeti la ĝishieraŭan "manifestadon". *Juan Villaró.*

Noto de la tradukanto. Dume oni fermigas ĉian laboristeman lernejon. Ekzistas furioza cenzuro, grandaj persekutadoj kaj krimoj. La laboristaj unuiĝoj estas eksterleĝaj. Senlaboreco kreskas senfine. Mizero morala, materiala kaj fizika invadas ĉiujn personojn. En kian abismon ni falos?

Nur savos la homaron la Tutmonda Revolucio Socia!

Ĉu Esperanto, ĉu la kaĉo diverslingva

Prenu n-o 79 (27) de "Sennaciulo" kaj komencu legi interesegan rakonton "simpla afero". Ĉu vi ĉion komprenas? Mi pensas, ke ne.

Ekprovu *esperante prononcante* tralegi la vortojn: Stephan, Gondrecourt, Marseille, Cean, Szieber, Clairvaŭx ktp. Ĉu tiuj-ĉi estas esperante skribitaj vortoj? Kial la aŭtoro kaj la redakcio ne povis skribi: Stefan', Gondrekur', Marsel', Sean', Ziber, Klervo' ktp.

Feliĉe mi mem malmulte konas francan, germanan kaj anglan lingvojn (vere, tre malmulte), sed miaj instruatoj, simplaj laboristoj, tiujn-ĉi lingvojn ne konas. Do, ili estas tre mirigitaj kaj insultis min, kaj "Sennaciulon" kaj Esperanton pro tio, ke en esperanta gazeto laborista troviĝas tiuj vortoj, por laboristoj-esperantistoj ne legeblaj.

Mi opinias, ke en mia vidpunkto mi ne estas sola, kaj tial mi petas redakcion de "Senn." kaj aŭtorojn, raportontajn al nia gazeto, ne forgesadi pri ĉi-tio[1]).

Nun sekvas rimarko el alia problemo. En la lasta n-o de "Senn." estis artikolo de s-ro (!) Brown (Broun). Kaj en n-o 28 (80) en korespondejo eĉ troviĝas anonco de iu "sinjoro" el Hispanio. Tiu-ĉi "sinjoreco" komencas tedi, mi opinias, ke proletario-esperantisto traktas vorton "sinjoro" kiel insulto, inda nur por neŭtralulo, sed ne por la SAT-ano. Do eligu ni ĉiujn "sinjorojn" el SAT-organoj. Ni ja batalas kontraŭ la sinjoraro. *N. (5291)*

Kontraŭ tro naskemaj "moruloj"

K-doj! Ĉu vi jam elpensis riton de nomdono por viaj esperantistidoj? Ne? — Do, vi ne estas veraj esperantistoj!

Se vi estas esperantistoj, vi ja "nepre devas nask*ad*i idojn, por krei sennaciecan generacion, kies patra lingvo estas esperanto".

Do, jen estas la nova plej ĝusta maniero disvastigi esperanton: nasku, eĉ naskadu plej multe da esperantistidoj. Ne nur geedzoj, sed „eĉ ĉiu esperantistino devas nepre naskadi idojn." (Bonmoraj gepatroj! gardu viajn modestajn filinojn de danĝera por ilia prudo esperanto!)

Ĉiu esp-isto devas tuj edziĝi por senprokraste komenci naskadi fi-zi-pi-hi (rig. n-o 28 de "Senn." — Kroniko) idojn. Cetere, por kio edziĝi? Sufiĉas, ke vi varbu por esperanto pli multe da knabinoj, devigante ilin sin okupi per naskado.

Tia estas la statuto de l' nova "esperantmora" (nun eĉ "sennaciecmora", gardu nin dio!) rondeto en Saratov, pri kiu ni legis en la citita n-o de nia organo.

Certe, ni — esperantistoj proletaj — jam estas alkutimigitaj al petolaĵoj de burĝaro, kiu havas multe da libera tempo por freneziĝi. Antaŭ kelkaj jaroj ni, SAT-anoj, diris al ĝi "For!" Sed nun la similaj elementoj jam komencas enŝteliĝi nian medion, nur imitante nian aspekton kaj terminaron.

Ili jam sufiĉe kompromitis sennaciismon. Ja la ideo estas nova, ankoraŭ multaj k-doj dubas pri ĝi.

SAT, laŭ mia opinio, devas urĝe haltigi la tro naskemajn "morulojn". Ili, certe, nasku, sed SAT ne estos akuŝisto por iliaj deliraj ideoj. *A. Tomo.*

El kelkaj protestoj tiurilataj ni presigis tiun ĉi. La Saratov-aj gek-doj konsideru ĝin kiel respondon por siaj pluaj tiurilataj sendaĵoj. *Red.*

[1]) Ĉar ni ankaŭ estas nur simplaj laboristoj, kiuj ne scias aliajn lingvojn, krom la gepatra (germ.) kaj Esp-o, ni petas niajn kunlaborantojn ĉiam aldoni (en parentezoj) la prononcadon de tiuj nomoj en Esp-o. *Red.*

Letero al niaj fratoj, enkarcerigitaj en kapitalistaj landoj

Niaj neforgeseblaj kamaradoj!

Ni, rivertransportistoj de l' urbo Kremenĉug (Dnepra baseno) aŭskultinte la raporton je temo, — "*Mopr*" (Internacia Ruĝa Helpo) kaj ĝia signifo por la tutmonda revolucio, — ni konstatas ĉiujn angorojn, kiujn suferas niaj karaj, translimaj kamaradoj en kapitalistaj landoj. Ni konkludis ĉiamaniere helpi, kiel morale, tiel ankaŭ materiale, kio stimulas pli baldaŭan liberigon de laboristoj kaj kamparanoj el la jugo de kapitalistoj kaj bienistoj. Do, kamaradoj, estu viglaj kaj rezistaj batalantoj por la venko, ĉar la horo de l' tutmonda revolucio proksimiĝas kaj ni estas ĉiutempe pretaj kaj atendas vian vokon.

Stampo: Государственное Верхне-Днепровское Пароходство Н. К. П. С. Кременчугское Агентство.

Kun kamarada saluto
Prof-delegito (Bemizov).
Prez. de kult-komisiono (Alpin). Politelmigrintoj (Goldfeder, Segal.)

Frata letero al la enkarcerigitoj en burĝa Bulgario

La komuna kunveno de l' membroj de klerigadunuiĝo kaj studantoj de l' pedagogi-teknikumo, sendas sian flaman saluton al la polit-enkarcerigitoj de la malliberejo en Pleven (Bulgario) — batalantoj por la afero de l' socialismo, kaj oferantaj sian vivon por la bono de l' laborista klaso. Ni, ĉiuj kunvenintaj ĉi-tie, per ĉiuj fibroj de niaj animoj protestegas kontraŭ la fi-agoj kaj premado super vi flanke de l' bulgaraj ekzekutistoj. Kunsentante vian malfacilan staton, ni promesas ĉiuforte helpi al vi kaj al viaj familioj. Ni estas certaj, ke viaj suferoj ne restos vanaj kaj venos la momento, kiam la tuta via landa burĝaro estas forigita kaj vi komencas konstruadi vian estonton same, kiel en nia liberigita Sovet-Unio.

Ni esperas, ke baldaŭ venos la fino de viaj suferoj kaj doloroj, kaj vi povos revenĝi viajn ekzekutistojn, turmentintajn kaj mortigintajn vin senĉese kaj senkompate.

Stampo de l' distrikto-filio de tutsoveta unuiĝo por klerigado.

Amike salutas vin la komuna kunveno de l' klerigunuiĝo kaj studantoj de pedagogi-teknikumo.

La malfeliĉo de l' sorĉlernanto

Certe vi ĉiuj legis la faman baladon de Goethe: "La sorĉlernanto". La misterajn fortojn malligis la disĉiplo de l' majstro kaj, kiam ili superakvas la domon, li ne plu trovas la necesajn vortojn, por ilin haltigi.

Same agis eminenta eks-Esperanstisto, proponante sian Idon. Li malligis la reformemajn fortojn kaj nun vane li petegas, vane li minacas, la reformmanio ne haltas, ĝi ne povas halti. Tute prave nia Idistestro deklaras en la gazeto por francaj Idistoj (1926 n-o 1 kaj 2), ke la logiko estas rimedo, ne celo, ke, kiam ĝi alportas komplikaĵon, ĝin oni devas senhezite flankenigi, ke la ĉefa kvalito de internacia lingvo estas ĝia facileco, ke fine la lingva provizoreco tedas, naŭzas la publikon . . . Vane! vane! Oni riproĉas lin, ke sufiĉajn ŝanĝojn li ne alportas al la Zamenhofa lingvo. Li respondas, ke la neceson li faris; sed la aliaj, ĉiu el la aliaj opinias, ke nur lia propra pli plena reformo estas kontentiga, ke post ĝia alpreno la pacon oni havos! Nu, estimataj sinjoroj, poste venas alia reformamanto, kiu alportas alian solvon, *definitivan* solvon!

Kun malĝoja koro nia gazetisto ŝajnas bedaŭri, ke li iam eliris el sia tendo por propagandi ĉu Esperanton ĉu Idon. La tre grandajn servojn, kiujn en la unua periodo, li faris al Esperanto, ni ne forgesas. Lia disfalo estis por liaj amikoj grava, dolora bato: la kreskadon de Esp. li laŭpove malplifaciligis, sed li ne sukcesis vivigi Idon, ĉar tiu ĉi, jam de sia naskiĝo kunportis principon de rapida morto: la rifuzon, — sub la erariga preteksto de senfina progresigo — la rifuzon de ĉia *firma* fundamento.

La sola timinda danĝero por *vivanta* lingvo (kiel Esperanto) *ne* estas ia ŝtoniĝo, *fakte neebla,* sed la sistema aliecigo kaj fine la disfalo en dialektojn, se ĉiu rajtas alporti sian sistemon kaj volas ĝin triumfigi. Amike aŭ severe oni kritikas nian fidelecon al nia fundamento. Al tiu fideleco, sola garantio de *normala* lingva evoluado kaj de internacia unueco, ni ŝuldas niajn progresojn; al ĝi ni ŝuldas la finan venkon.

Paris, 30. Marto 1926. *Th. Cart,*
Prez. de la Akad., 12 rue Soufflor.



VIa SAT-KONGRESO EN LENINGRAD
5.—10. aŭgusto 1926

3. KOMUNIKO

KONGRES-KOMITATO

Gek-doj: *Koĉkin, Lisicin, Podkaminer, Semjonova, Urban.*

KORESPONDADRESO:

K-do S. Podkaminer, Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad — Sovetio.

KOTIZO: Egala al la jara SAT-kotizo.

ALIĜILOJ

Skribu la nomon, antaŭnomon, adreson, profesion, partitendencon, n-o de SAT-matrikulo, aktiva aŭ pasiva, membrecon.

Pasportoj: K-doj aliĝintaj ricevos kongres-kartojn je kiuj sovetaj konsulejoj senprokraste donos vizojn. Do, necesas la plej baldaŭa aliĝo de ĉiuj kongresvizitontoj por ĝustatempa alsendo de kongres-kartoj. Ni klopodas pri la senpagaj vizoj aŭ almenaŭ rabatitaj.

Loĝejoj: Estas garantiata senpaga kaj oportuna loĝejo por ĉiu alveturonto.

Manĝado: Alveturontoj estos provizataj per bona kaj malmultekosta manĝado. Proksimuma elspezo egalos je 1 rublo (½ dol.) potage.

Veturado: Estas rekomendata veturado per ŝipo, ĉar fervoja trafiko tra Polio, Latvio k. a. estas pli malfacila. Ni rekomendas aranĝon de komuna ŝipveturo el Stettin (Germ.). Vojaĝkostoj estos komunikataj plej proksimtempe.

Fakkunsidoj: Estos organizataj dum la kongreso fakkunsidoj laŭ la specialeco: poŝtistoj, metalistoj, instruistoj ktp. Estas dezirinde, ke k-doj antaŭe anoncu la partoprenon en tiuj kunsidoj por ke K. K. povu ĝustatempe prizorgi necesajn ejojn.

Ekskursoj: Estas projektitaj diversspecaj ekskursoj en fabrikojn, muzeojn, lab. klubojn, palacojn, lernejojn, ripozdomojn ktp. Aliĝontoj nepre menciu la deziratajn por observado flankojn de nia vivo. Estas projektata postkongresa ekskurso al Moskvo.

Sendu aliĝilojn kaj kotizojn al:

k-do R. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1.

Sovetiaj gek-doj sendu al k-do *S. Podkaminer* laŭ supremontrita adreso.

---

1. listo
de aliĝintoj al la VI. SAT-Kongreso

1. K-do Podkaminer, S., Leningrad, 1679
2. „ Dunajev „ 5869
3. K-dino Brukson, M. „ 1396
4. K-do Gordon „ 4045
5. „ Lisicin „ 5333
6. „ Firsov „
7. K-dino Jakovleva, Z. „ 5677
8. K-do Piĉahĉi „ 3814
9. „ Salajev, I. „ 3979
10. „ Urban, M. „ 5089
11. „ Brukson, I „ 1896
12. „ Kockin, P. „ 3370
13. „ Noseviĉ, B. „ 5410
14. K-dino Ivanova, V. „ 5676
15. K-do Bankov, J. „ 5433
16. K-dino Grekova, E. „ 6472
17. K-do Ŝilsulman, Grozov 4639
18. „ Kockin, A., Leningrad 3369
19. „ Konovalov, H., N.-Novgorod 641

≡ KRONIKO ≡

Anglio

London. Sur tagordo de la ĉiujara kongreso de virinfako de la lab. partio, kiu okazos ĉe Huddersfield 12.—13. Majo, estas propono favoranta Esp-on en la Soc. Internacio pro ĝia pruvita utileco en la “Labour Woman“ kaj la decido de la brita sindikataro (TUC). — Kiel kutime, esp-a parolado aŭdiĝis en la grandega demonstracio la 1. de Majo en Hyde Park. Eĉ la policanoj inter la amaso koniĝis je SAT. En la speciala numero de “Landsbury's Labour Weekly“ kaj la “Sunday Worker“ enpresiĝis artikoloj verkitaj de 488 pri praktika internaciismo kaj pri la funkcio de SAT.

Ĉekoslovakio

Gablonz a. N. Dimanĉon la 25. Aprilo la ĉi tiea lab. esp. grupo aranĝis ekskurson sur la monton “Königshöhe“ kie ni renkontiĝis kun la gelernantoj el Kamnitztal. Kiel gasto ankaŭ ĉeestis nia k-dino Bouda el Niederhänichen ap. Reichenberg (la delegitino de la ĉekosl. laboristaro al Ruslando). Ĉeestis 30 partoprenintoj. La celo de la kunveno estis ekzercadi nian lingvon kaj komune enstudi revoluciajn kantojn, kiujn ni kantos ĉe la diversaj demonstracioj kaj festenoj de la laboristaro. *E. Bauer*

Francio

Lyon. La 18. Aprilo, en la granda festsalono de la Laborborso, okazis propag. festo organizita de Esp. Lab. Grupo el Lyon. Ĉeestis pli ol 500 personoj, kiuj tre interesiĝis pri nia afero kaj, vidante nian gazetekspozicion, konstatis, kiom multe Esp.o estas jam disvastigita en ĉiuj medioj kaj landoj. K-do M. Roux paroladis kaj demonstris utilecon de L. I. por laboristaro. Li alvokis finante, ke internaciistoj fariĝu vere tiaj, kiaj SAT-anoj ja estas. Post la koncerto, R. legis al la ĉeestantaro leteron de k-do *Henri Barbusse,* kiu bedaŭris, ke li ne povis partopreni la feston kaj *akcentis, ke ĉiuj proletoj devas lerni kaj uzi esperanton, por helpi al plena elsklavigo.* Ĉiuj lokaj gazetoj menciis la sukceson de tiu propaganda festo. Neniam tiom da personoj atentis pri nia movado. Tio pruvas, ke nia insistemo iom post iom venkos dubon de l' proletariaj masoj. *(132)*

Germanio

Dresden. La iama distrikto Grand-Dresdeno, neorganizita ĉe LEA, likvidiĝis komence de nuna jaro. Fondiĝis anstataŭ ĝi, distrikto “Dresdena Industriregiono“. Do gek-doj en Dresden kaj ĉirkaŭaĵo denove organiziĝis ĉe LEA post pli ol trijara izoliĝo de la samlingve teritoriaj k-doj. Iuj SAT-anoj reen al LEA gvidis ĉi-tiean movadon konsciiĝante, ke SAT-movado nur povas kreski bone, se ia supozo estas plenumita. Nome, kampo bonpreparita de impona varbasocio. Al la distrikto aniĝis la grupoj Heidenau, Meissen, Freital, Klotzsche kaj Dresden. Ĉe la fondiĝo en jan. 1926 ĝi havis 128 membrojn, hodiaŭ 168. Esp-o nun eniĝas ankaŭ urbetojn kaj vilaĝojn. La popollernejo en Zschachwitz ap. Dresden enkondukis Esp-on kiel libervolan instrufakon. Kelkloke en la distrikto okazas klopodoj plivigligi la Esp.-mov. kaj per tio estigi bonan fundamenton por nia SAT-mov. Alsendaĵoj rilatantaj la distrikton estu adresataj: Paul Köckeritz, Dresden-A 28, Tharandter Str. 6.

Glauchau (Saksio). La Esp-a mov. tie ĉi lastatempe progresis, kaŭzata per fervora propagando, per ekspozicioj, paroladoj kaj ĉefe per persona agitado. Krom ĉiusemajnaj kunvenoj de progresantoj ni aranĝis kursojn por komencantoj, multaj aliĝis al SAT. Depost pasko Esp-o estas enkondukita en la popollernejoj de Glauchau. Ankaŭ en vilaĝo Remse apud Gl. ni aranĝis Esp-an kurs., kiun gvidas k-do Lahr laŭ “PETRO“ Je la 17. kaj 18. de Julio okazos konferenco de LEA, distr. Erzgebirge-Vogtland. Por aranĝi la konferencon kiel eble plej interesa propagandcele, ni petas la k-dojn, sendu mallongajn salutojn per kartoj aŭ leteroj. Rekompenco estas garantiata. Sendu al prezidanto Kurt Floss, Glauchau i. S., Friedrichstr. 7, I, (Germanio). *K. Floss.*

Orient-Saksio. La 2. Majo la distrikto malfermis kurson por kursgvidantoj, partoprenas 23 gek-doj el 8 lokoj. Gvidanto k-do Scherbaum. Instrumetodo rekta, laŭ lernolibro de l' kursgvidanto (kial ne laŭ Petro?—Red.). La movado estas vigla, la intereso ega. La distrikto nombras 100 membrojn, inter ili estas 75 SAT-anoj. *Scherbaum*

Schweidnitz. La 17. kaj 18. Apr. okazis distriktkunveno de LEA-Distr. Silezio. Je la 1. Majo ni propagandis per kantado, parolado dum kunveno, forsendo de salut-leteroj al eksterl. grupoj, aranĝis ekspozicion. Kun 3 eksterl. grupoj ni komencis korespondadon. K-do S. aranĝis Esp-o-Informejon. La socialdem. kaj kom. partioj nur malforte subtenas nin. Ili nur malrapide komencas kompreni la gravan rolon de Esp-o kiel armilon de la mondproletaro. La burĝa gazetaro malaprobas ĉiujn artikolojn, ne neŭtralajn“! *(1851)*

Wiesdorf (Rejnlando). Dank al nia fervora kamarado E. Schmidt nia grupo nun havas propran esp-an hejmon, konstruita de niaj k-doj mem. La 24. Aprilo okazis la festena inaŭguro. Inter la gastoj troviĝis la estro de la “Prolet. Kultur-Kartelo“. Li esprimis, ke nia movado estas vera potenco por interligi la mond-laboristaron. La presservanto de la loka lab. gazeto laŭde raportis pri nia lingvo. La ne ŝatataj kunvenoj en gastejo ne plu okazos. Posedante propran hejmon, ni nun volas pli grandigi nian grupon, varbi novajn batalantojn por nia afero. *(2171)*

Zittau (Saksio). Lastjare nia grupo “Nova Tempo“ klopodis kune kun la neŭtrala grupo “Societo Esperanto“ pro la enkonduko de nia lingvo en la popollernejojn. Preskaŭ ni tute estus havintaj sukceson, se la urbestro ne havus antipation kontraŭ Esp-o, kaj tio malhelpis la nunjaran enkondukon. Okazis manovroj en gepatraj konsilantaro kaj intrigoj en la urba parlamento flanke de l' urbestro. En la nuna jaro ni denove devas postuli nian lastjaran proponon. Pro tiu ĉi laboro ni bezonas ciferojn pri la Esp-a mov. en diversaj landoj. Ni petas la gvidantajn gek-dojn diverslandajn komuniki al ni la proksimuman Esperantistaron en la koncerna lando. Sendu la sciigon al k-do *A. Dittmann, Zittau Sa., Frauenthorstr. 11, bei Franke,* kiu jam antaŭe koregе dankas al ĉiuj gek-doj. *(4242)*

Sovet-Unio

Ivanovo-Voznesensk. 22.—23. Majo okazos Esp. Gub. Konferenco (SEU kaj SAT), la unua en tekstil-regiono. Por la sukceso helpos sendaĵoj, salutoj eksterl. ktp. Dum Majo oni dissendas per Radio 8 div. esp.-koncertojn. Geaŭskultantoj estas petataj komuniki pri la aŭdebleco laŭ adr.: “Gub. Fako SEU, Socialista ‘Dom Prosveŝcenia‘ Iv.-Voznesensk“.

Peresp. lab. ĉiam plivigliĝas. Lokaj gaz. kaj ĵurn. represas eksterl. ricevitaĵojn. La eksterl. gek-doj estas invitataj esti konstantaj gazet-korespondantoj (LABKOR). Plej multaj let. oni skribas el Germanio. *Esperkor.*

Pskov. La 11. Apr. estas Gub. Fako de SEU. Ĉeestis 24 gek-doj, el ili 11 esp-istoj. Antaŭ malfermo k-do raportis pri “Lab. Klaso kaj Esp-o“. La subraportantoj parolis pri rezultoj de siaj korespondadoj kun eksterl. k-doj. Elektita provizora komitato el kvin gek-doj (el ili tri SAT-anoj), organizita subfako de internacia kunligo. La taskoj: organizi esp. ĉelojn en fabrikoj, oficejo, lernejo; kunligiĝi kun provincaj organizaĵoj kaj izoluloj; komenci varbadon de novaj anoj inter sen- kaj partianoj, lab. korespondanto;

propagandi kaj agiti por Esp-o per organizo de kursoj, amuzvesperoj, lecionoj, raportoj, kursoj por progresintoj.

Kursoj estas nun ĉe Vespera Lernejo por plenaĝuloj, en klubo de fabriko "Ŝpatat" (Ŝnuro) en Koretigdomo kaj en Gub. Fako de kolektantoj. Ĝis Sept. 1925 en urbo estis 7 k-doj, nun — 16, ĉiuj aliĝintaj al SEU. La nombro pliiĝos ĝis 40—50 kiam aliĝos la provincanoj. En loka gazeto oni presigis pri malfermo de fakoj kaj pri la XVIII. en Edinburgo. (Kial ne pri la VI. SAT-kongreso?) En murgazetoj aperis 6 notetoj pri Esp-o; unu (terkulturiga fako) havas konstantan angulon por Esp-o; en lasta numero estas enpresigitaj du tradukitaj leteroj (Germanio kaj Ĉekoslovakio). Ĝis nun fako ne havas ejon. Provizora Adreso: Pskov, Pervomajskaja, 11, al k-do Sorokin E. *(3939)*

Smolensk. Antaŭ tri monatoj oni elektis inter la lernantoj estontajn instruistojn kaj kolektis ilin en supera kurso. Instruisto estis politika emigranto, ĵus alveninta en la urbon. *Kiel bazo de instruado, oni uzis la internacian lernolibron PETRO,* kaj ekskluzive parol. metodon, ĉar la instruisto ne konis rusan lingvon. La gekursanoj, tiel serioze kaj entuziasme laboris, ke nun, ili povas longe interparoli kaj diskuti esperante, kiel malnovaj esp-istoj. 15 kamaradoj finis la instruadon. Jam ses novaj kursoj estas gvidataj de ili. *(5065)*

Irkutsk (geografia mezo de Azio). Esperanto en nia urbo rapide disvastiĝas. En pionirgrupo "NI" Esp-o fariĝis jam deviga lernobjekto (45 infanoj). Gvid. Krjukov. Rondetoj ekzistas en multaj sovetlernejoj. Ĉiujare funkcias po du ĝeneralaj kursoj pagataj, kiujn partoprenas po 25—30 pers. Gvidas Babiĉev. Komĉelo de junuloj ĉe loka ĉeffinancejo elektis specialan komisionon por korespondi kun eksterlandaj samunianoj. En klubo de poŝtistoj esperanta grupo, gvidata de Manzyrev, eldonis bonege bilditan murgazeton. La sama grupo aranĝis kinovesperon invade vizititan de publiko. La vespero donis bonan financan rezulton. Nia SAT-grupo konsistas el 18 anoj. 6 el ili abonas "Senn.", ĉiuj abonas "S. R." Supozeble post kelkaj monatoj la grupo devas duobliĝi (ĝin eniras nur kiuj jam fluparolas nian lingvon). *M. Krjukov.*

Svedio

Göteborg. Dum la printempo estis malfermitaj kvar kursoj inter laboristoj, unu aranĝita de Labor. Kleriga Asocio kun 18 partoprenantoj. Gvidanto k-do Adamson. Kurson inter laboristoj ĉe Mara Uzino Eriksberg gvidas k-do Karlsson. 14 partoprenantoj. K-do Johanson gvidas kurson kun 10 partoprenantoj kaj k-do Holmgren kurson inter laboristoj ĉe fabriko Original Allmer. Krom tio okazas kursoj por laboristoj en 6 dokoj. Sveda Lab. Esp. Asocio havas nun pli ol 750 membrojn. Dum la lasta tempo ni pere de SLEA varbis novajn membrojn al SAT kaj ni esperas. ke baldaŭ ĉiuj laboristoj scipovantaj esp-on aliĝos al SAT. Ni laboras en bona kontakto kun SAT kaj pritraktas nian Asocion kiel poresp-an organon por agitado de esperanto inter la sveda laboristaro. *(902)*

Ukrainio.

Kremenĉug. La 9. Aprilo k-do E. Izgur estis salutinta la distriktan konferencon de laboristaj, vilaĝanaj k. ruĝarmean. korespondantoj je la nomo de SAT. La konferenco rezolucie esprimis sian simpation al SAT. — Okazis prelego de k-do Goldfeder pri IRH kaj Esp-o ĉe kunveno de instruistoj kaj pedagogi-studentoj, en "ejo de klerigado" por multcenta aŭskultantaro. — Societo "Lab. Solidareco" reeldonis flugfoliojn kun pri-esp-a artikolo de M. Boguslavski (3a—4a milo). La samnoma SAT-propagandejo aperigis popularan broŝuron ruslingvan pri la temo: "Kiel organizi internacian korespondadon pere de SAT. — En la transdnepra antaŭurbo Krukov fondiĝis SAT-grupeto, kalkulante jam 12 aktiv. kaj pasiv. anojn. *V. K.*

LA REDAKCIO
ATENDAS MANUSKRIPTOJN PRI LABORISTA MOVADO, LABORISTA ESPERANTO-MOVADO KAJ VIVKONDIĈOJ, PRECIPE EL NORDAJ LANDOJ (DANIO, NORVEGIO, HOLANDO KTP.), OKCIDENTAJ KAJ TRANSMARAJ LANDOJ

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L — letero. PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. espajo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

— K-do *Karolo Wiedemann,* Quellenstr. 136/36, *Wien X,* dez. interŝ. belegajn PI de urbvidindaĵoj k. ĉ. l. Resp. honeste garantiata.

Ĉekoslovakio

— K-do *Rudolf Burda, Plzen,* sciigas al siaj koresp-antoj, nericevante resp., pardoni al li, ĉar li estas maldungita, k. krom tio, kiel malsanulo en hospitalo loka. La let. por li estu adresataj al malnova adr., k. de tempo al tempo li penos resp. al ĉiuj. Kelkaj k-doj postulas gaz. plakatojn ktp. estas neeble al ili tion nun sendi. Ankaŭ tiuj k-doj k. redakcioj, kiuj ricevadis raportojn por gaz. devas atendi ĝis lia situacio pliboniĝos.

Ĉinio

— K-do *Kadzuvo Tava,* Poŝtkesto, n-o 334, *Harbin, Pristan,* dez. koresp. pri esp. k. kom. mov. k. ĉ. l., precipe pri kom. jun. mov. en Sovetio.

Francio

— K-do *A. Soares,* 12, rue de Mathis, *Paris, XIX.,* pri soc. evolucio de primitivaj homoj. Nepre resp.

Germanio

— "*Esp.-Rondeto*" dez. koresp. pri ĉ. temoj kun gek-doj ĉiulandaj, L, PK, PI. Adr.: k-do *A. Schäfer,* Beethovenstr. 1, *Stuttgart.*

Infana ŝtrumpeto

La lasta akto de grandskala ŝteladproceso en militjuĝejo estas finita nokte kaj tuj estis komencita la translokado de dekoraĵoj, nova horizonto estas starigita kaj eklumigita sangoruĝa lumo: oni komencas la proceson kontraŭ kapitano Koch kaj liaj subuloj-soldatoj. La kulisoj — patruja liberigo de "azianoj", la horizonto — ĉirkaŭaĵo de Lubana: lago en Latvio, lumigado — pafilaj fajretoj kaj sangomakuloj sur la neĝo, tempo — 1919 — 20 j.

Centra figuro de proceso — Koch — estas bone konata ankaŭ kiel aktiva "patrioto", kiu laŭokaze ne nur rajtas, sed eĉ devas fari ion eksterordinaran. Nun tiu-ĉi patrioto okupas la seĝon por akuzitoj. Pro kio? Ho, nenio grava estas: li kelkfoje ordonis mortpafi jen po unu, jen po 2—3 transirantoj el Rusio kaj fine glorkronis sian kapon de rotkomandanto per ordono mortpafi . . . 1 virinon, 2 infanetojn kaj 3 virojn. Mortigitaj, laŭdece, estas ĉirkaŭrabitaj ĝis la pantalonoj, eble eĉ plu.

Sur la sama seĝo sidas ankaŭ la ordonplenumantoj — barbuloj-rusoj, vilaĝanoj el Latgala provinco, kiuj preskaŭ ĉiuj jam konfesis: jes, ili mortigis, unu ricevis botojn, aliaj po fingroringo, horloĝo ktp. Nur la mono kaj pli valoraj objektoj estis transdonataj al kapitano . . .

Imagu nur jenan scenon: trans miloj da teruraĵoj en Latvion rapidas gepatroj kun siaj infanetoj, en sia patrolando ili esperas rifuĝi de malsato kaj aliaj turmentoj. Ili jam feliĉe transiris la limon kaj elkore preĝas al stelumita ĉielo. Kaj, jen, subita ekkrio "halt'!" kaj post momento pafiloj sendas al ĉielo la preĝantojn mem: — Tiuloke — rakontas atestanto, — mi vidis teren ĵetitan infanan ŝtrumpeton, pecon de infana jaketo . . . la neĝo ĉirkaŭe estis sangomakulita . . . Post kelka tempo la hundoj aŭ vulpoj disfosis la teron kaj estis videblaj homaj ostoj . . . .

Ho, vi, burĝaj sinjorinoj, kiuj ploras dum teatro-prezentadoj, kiuj ĝemas, vidante malgrasan kataĉon — kial vi ne alvenis por aŭskulti kiel estis mortigataj virinoj kaj infanoj! Kie estas vi, bestprotektantoj!

Eble la atestantoj trograndigas la aferon, aŭ diras malveron. Sed, jen, la policisto, kiu esploris ĉi-okazojn, rakontas tute la samon.

— Ĉu en ĉirkaŭaĵo estis parolata pri mortigo kaj prirabado de ĉiuj transirantoj el Rusio? — demandas iun atestanton la advokato.

— Jes, pri tio oni parolis. Mian domon okupis soldatoj kaj ili rakontis . . .

— Ankaŭ la soldatoj parolis?

— Jes, ankaŭ ili! . . .

La akuzitaj soldatoj sidas, mallevinte okulojn, ili ne komprenas la latvan lingvon. Nur la kapitano, vivgaja ruĝvangulo, aspektas kuraĝa — li konscias sian altvaloran laboron pro bono de patrujo, ĉu ĝi ne estos laŭmerite taksita . . .

Oni forgesos la bravajn rotestrojn kaj iliajn heroaĵojn. Eble nur iam ies cerbo pentros la scenon: lago, solestaranta betuleto surborde, infana ŝtrumpeto kaj sanga makulo sur la neĝo . . .

El revuo de latvaj poŝtistoj "Vestnic" trad. *S.*

— SAT-anoj laborantaj en granda teks-palig-tinktur- k. apretur-fabriko, dez. kor. kun samaj fakgrupoj aŭ tiaj laboristoj ĉiul. Inter ni ankaŭ troviĝas metiistoj: maŝinkonstruisto, tornisto, kuproforĝisto, hejtisto. Resp. garantiata. Adr.: *Esperanto-fakgrupo* en firmao F. A. Bernhardt, *Zittaŭ i. S.*

— Lab. Esp. Grupo "*Unueco*" Somerau, dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., L, PI, Esp-gaz. Ĉiam resp. Adr.: K-do *Otto Michel, Sommerau n-o 30, b. Reibersdorf i. S.*

— K-do *Eugen Schon,* Gieselstr. 1, III. *Oppeln* (Oberschlesien), dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-do *Alfred Fischer, Zwickau i. S.,* Kreiskrankenstift, Station I, (grave, akcidentita dum laboro). L, PK, k. ĉ. l.

— "*Esperanto-Sekcio de Naturamikoj*" dez. kor. pri naturbelecoj, lab. k. junulmov. socialistaj k. ĉ. l., krom Germanio k. Aŭstrio, L, PI, Adr.: *Hermann Wotschke,* Am Queckbrunnen 1, I, *Dresden-A 1.*

— Esp. Sekcio inter "La Naturamikoj" dez. koresp. k. ĉ. l. Adr.: *Felix Hans,* Hauptstr. 6, *Glauchau-Rothenbach i. S.*

— 15 gelernantoj dez. kor. k. ĉ. l. L, PK, PI. Skribu tre legeble! Adr.: K-do *Karl Reichelt, Pirna-Neudorf* n-o 36.

— K-do *Arno Dahle,* Chausseestr. 1, *Holzweissig b. Bitterfeld,* dez. kor. pri ĉ. temoj L, PK, PI, k. ĉ. l.

Litovio

— Juna esper.-instr. *Edo Mediŝausko, Kietaviŝkis,* Traku apskr., dez. kor. k. ĉ. l. gek-doj, L, PK, PI, PM, (ne laŭ katal.).

Sovet-Unio

— "Junaj gekomunistoj" dez. kor. pri lab. vivo k. ĉ. l. Adr.: *Klub* Elektro-Stancii, Obvodnij, ug. Bronnenskoj *Leningrad.*

— K-do *P. Mitrofanov,* Sovpartŝkola, *Krivoj Rog,* dez. koresp. kun laboristoj pri politika k. ekonomia vivoj, L, k. ĉ. l.

— "Junaj gekomunistoj" dez. kor. pri lab. vivo k. ĉ. l. Adr.: Klub, "*Junij Komunar*" fabr. Raboĉij Nerskaja Zastava *Leningrad.*

— "*Laborista Politeknikumo*" okazigos propagandan Esp.-vesperon kun ekspozicio de la esp. rondeto, kiu petas gek-dojn de ĉ. l. helpi en tio, sendante naciajn afiŝojn (oni traduku surskribojn), ilustr., gaz., PK, pentraĵojn ktp. Reciproke ĉiu sendinto ricevos el Sovetlando ion interesan. Adr.: str. de Gercen 40, *Leningrad.*

— K-do *Tretjakov, S.,* Jamki N. 37, *Voronej,* dez. interŝ. L, PK, PI, k. kor. pri div. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata.

— K-do *N. Karasev,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, *St. Aleksandrovskaja,* Sev. Zap. ĵ. d. (Leningradsk. gub.) Volĥonskoje ŝosse n-o 85—1.

— K-do *V. Svojlov,* studento, dez. kor. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata. Adr.: Ligovskaje 44, kv. 333, *Leningrad.*

— K-do *A. G. Krestov,* Sosnevskaja Manufakt., *Ivanovo-Voznesensk,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-dino *Helene Ŝaŝkova,* studentino, Pedteknikumo, Soveta, 4, *Juĵa.* (Iv.-Vosnesensk. gub.) k. ĉ. l.

— K-do *M. G. Ŝibajev,* Bolŝaja Dm. Manuf., k. 27, *Iv.-Voznesensk,* L, PK, k. ĉ. l.

— *Lab. Grupo, Bonjaĉki,* d. 1, Cvetkov, *St. Viĉuga,* Sev. ĵ. d. Kineŝma u. (Iv.-Voznesensk. gub.) pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— Skribu al studentinoj! Adr.: "*Esperanto*", Stepanova ul., Studdom, Ivanovo-Voznesensk.

— K-do *Nikolo Graĉov,* Sokovskaja, 11, *Iv-Voznesensk,* pri ĉ. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— "*Rondeto Esperantista*" dez. koresp. k. ĉ. l. pri div. temoj. *Stavropol, Kaŭkazo Meĵsojuznij klub.*

— "*80 gelernantoj*" (12—16j.) dez. kor. kun lernantoj k. junaj pioniroj. Adr.: Ŝkola N 22, *Rostov s./D.* Krasnoarmejskaja N 1.

— "*Esperantista rondeto*" ĉe klubo de P. T. T. kor. pri ĉ. temoj L, PK, PI, k. ĉ. l. Adr.: *Odessa,* Strato de Ostrovidov 100 Klub P. T. T.

— K-do *Jurio Kravĉenko,* Oljginskaja 7, *Stavropolo-Kaŭkazo,* dez. kor. pri agrokulturo selekcio de kreskaĵoj k. a. temoj.

— 22 j. instruisto de germana kolonio *H. Buĥholz,* Protopopovka *Dolinskaja* (Ekaterin. gub.), dez. koresp. L, k. ĉ. l.

— 32 j. instruisto *G. Kuzmenko,* Isplkom, *Dolinskaja* (Ekaterin. gub.), dez. koresp. nur kun samprofesianoj pri metodoj de instruado, profesia mov. k. a. temoj interesaj por instruistaro, L, k. ĉ. l.

— 22 j. teknikisto-konstruisto *A. Plaĉinda,* str. Gogola 6, *Dolinskaja* (Ekaterin. gub.), dez. koresp. pri temoj rilantantaj al lia profesio L, k. ĉ. l.

— Ŝakrondeto de laborista klubo "Profintern" dez. kor. k. ŝakludi kontraŭ iu eksterlanda laborista ŝakklubo. Adr.: Klubo "Profintern" Vasil. ostr. 9 lin. 50. *Leningrad.*

Parto de koresp.-anoncoj estas prokrasta, ĝis sekvanta n-ro pro manko da loko. *Red.*

Esperanto-Kurso ĉe Fervojista Klubo "Kotlov" en Krjukov — apud Dnepro
deziras korespondi kun fervojistaj, sindikataj, jun-komunistaj organizaĵoj, jun-pioniraj grupoj ktp. pri lab. vivo, pri sindikata, partia, pionira movadoj. — Respondo garantiata!
Adreso: **Esperanto-Kruĵok, Klub im. Kotlova, Kremenĉug — Krjukov — UKRAINIO.**

Odessa distrikta oficejo

de lab. korespondantoj ĉe gazeto "Izvestija" koresp. kun gelaboristoj de ĉ. l. pri politikaj, ekonom. viv-laborkondiĉoj ktp.
Adr.: *Redakcio de "Izvestija", Ugolok Rabkora, Puŝkinskaja 32, Odessa USSR.*

ATENTU!

"Odessa Centra Klubo" de Profsindikato de Loka Transporto dez. koresp. pri profes. mov., laborkondiĉoj, lab. vivo ktp. kun transport-org., kluboj, uzin-komitatoj de ĉ. l. La profsindik. konsistas el ŝarĝistoj, ŝoforoj, ĉaristoj, aviatistoj, transport-oficistoj ktp. Adr.: *Centra Klubo de Loka Transporto je nomo de k-do Judileviĉ, Avĉinikonski pereulok, 4, Odessa.*

AL SAT-ANARO TUTMONDA!

En ruĝa urbo Leningrad dum 5. ĝis 10. Aŭg. okazos kongreso de SAT. Ĵus organizita gub.-fako de SEU invitas kaj petas veturontajn eksterlandajn gekamaradojn al VI. kongreso **viziti urbon Pskov.**
Tie ĉi vi ekvidos laboristan, kluban, profesian k. a. vivon. Gelaboristoj montros al vi siajn fabrikojn, uzinojn, kaj vizitos urbajn muzeojn, oficialajn instituciojn. Per via vizito vi tre helpos nian aferon por disvastigi Esperanton inter gelaboristoj kaj kian utilon oni povas havi per ĝi. Ni SAT- kaj SEU-anoj esperas, ke vi vizitos nian urbon. Ni ĉiam estas pretaj al viaj servoj. Sciigu nin pri tago de via alveno.
Adr.: k-do *Sorokin E., Pervomajskaja 11, Pskov, Sovet-Unio.*

KARAVANO DE LONDONO AL LENINGRADO
SAT-ano J. W. Sons, delegito de la Lab. Esperanto-Klubo Londono, kun la aprobo de la komitato de BLES (Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj) aranĝas karavanon al la VI. Kongreso de SAT Londono—Leningrado. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, skribu senprokraste al: **MACCLESFIELD ST., LONDON W. 1 (Anglio)**

Eldona Fako Kooperativa de SAT
BALDAŬ APEROS
ETIKO
ĉ. 240 PAĜA
VERKO DE KROPOTKIN

Ruslingvanoj! BONA SAT-PROPAGANDILO! **Atentu!**
Aperis broŝuro pri nia Internacia Laborista Korespondado kaj servoj de SAT:
KIEL ORGANIZI LA INTERNACIAN KORESPONDADON DE L' PROLETARO
Prezo (inkluz. afranko) 9 kop. — Malpli ol 3 ekz. neliverеblaj
Mendebla ĉe: **"Laborista Solidareco" — Kremenĉug**

SAT-INSIGNOJ
Prezo 0,80 mk. g.


Prezo 0,60 mk. g.
Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG